en la kampo de la fizika antropologio. Tre fortaj estas la mongoloidaj trajtoj en okcidenta Pacifiko, kaj ili konsiderinde malpliiĝas de okcidento al oriento. Se la Polinezianoj estus venintaj el Ameriko, do oni devus supozi ke tiaj trajtoj estus tiel fortaj en orienta Pacifiko kiel ili estas ĉe la sudamerikaj indianoj.

Ĉu Con-tici estas Tiki? Kiam Heyerdahl identigas la polinezian *Tiki* kun la perua heroo *Kon-Tiki*, la nepreparita leganto povas esti miskondukata. La plena nomo de Kon-Tiki estas *Con-Tici Wiracocha; Con-Tici* estas nur titolo. Preni parton de tiu titolo, la vorton *Tici*, kaj egaligi ĝin al la polinezia nomo Tiki, estas tiom pli arbitre, ĉar ne ekzistas sufiĉe da atestaĵo en la tradicio por ĝin pravigi.

Restas iom da valoro. La merito de Heyerdahl troviĝas ne nur en lia demonstro pri la ebleco de flosvojaĝado trans Pacifikon, sed ankaŭ en la fakto ke li aldonis kelkajn novajn trajtojn al la longa listo de bone konataj similaĵoj inter Ameriko, Polinezio, kaj la Malnova Mondo. Oni povas eĉ konsenti ke kelkaj el ĉi tiuj komunaj elementoj povas esti alportitaj al Polinezio per flosvojaĝoj el Ameriko. Dum tio ĉi riĉigas nian scion pri la vojoj de ebla transpacifika kultura kontakto, ĝi ne povas ŝanceli la firme starantan kredon de la pli multaj aŭtoritatuloj, ke la Polinezianoj devenis el Azio.

Kontribuis C. C. Cummingsmith, S.M., — Honolulu.

019.941
(048.1)

RECENZOJ KAJ BIBLIOGRAFIO.

910.45 : 629.121

Ekspedicio Kon-Tiki de *Thor Heyerdahl*, tradukita el la norvega lingvo de *Carsten Brynildsen* kaj lingve prilaborita de *Stellan Engholm*.

Eldonita de *Eldona Societo Esperanto*, Stockholm 19, Svedujo.

Formato: 16 × 23 cm². 208 paĝoj + 28 paĝoj da fotoilustraĵoj. Bindita en marblua tolo kun ora surpreso. Prezo: svedaj kronoj 16.75.

Jen la interesega rakonto pri flosvojaĝo tra 8000 km trans Pacifikon kiun iniciatis la aŭtoro kaj kiun li entreprenis kun kvar aliaj norvegoj kaj unu svedo.

Post venko de multaj malfacilegaĵoj kiuj povus ŝajni nevenkeblaj kaj kiuj igis la patrinon de la aŭtoro skribi al sia filo: „— kaj mi nun nur dezirus scii, ke vi ĉiuj ses estas sekure sur la floso!", la ses kuraĝaj viroj, spitante ĉiujn malbonajn aŭgurojn, startis per sia velanta floso el balza-trunkoj, fidela kopio de la antikvaj indianaj flosoj, la 28an de aprilo 1947 en *Callao*, Peruo, por surgrundiĝi la 7an de aŭgusto, post tre aventuroriĉa veturo, sur rifo de *Raroia*, jam ne tre malproksime de *Tahiti*.

La aŭtoro estas bonega rakontanto, kaj la traduko estas tia, ke estas efektiva plezuro legi ĉi tiun historion kiu strečas nian atenton de la unua ĝis la lasta paĝo.

Per ĉi tiu vojaĝo la aŭtoro volis subteni kaj konigi sian teorion ke la loĝantoj de la pacifikaj insuloj venis tien el Ameriko. Precipe en la unua ĉapitro — sed ankaŭ poste, dissemitaj tra la libro — li donas multajn argumentojn por sia tezo, argumentojn, cetere, kiuj — kiel montras alia artikolo en ĉi tiu numero de Scienca Revuo — ne sukcesis konvinki la fakulojn pri la ĝusteco de lia teorio.

Via recenzanto estas neniel kompetenta enmiksiĝi en ĉi tiu „batalo pri teorioj", sed tion li scias tute certe, ke ĉi tiu libro apartenas al la plej bonaj iam aperintaj en Esperanto, kaj ke ĉiu esperantisto por kiu Esperanto estas iom pli ol poŝtmarkkolektilo, nepre klopodu akiri ĝin.

Estas vere ke la prezo povas ŝajni iom alta, sed se oni konsideras ke ĉi tiu bonega libro estas presita sur treege bonkvalita papero, havas belan luksan bindon, unuvorte: estas juvelo, kaj se oni scias ke ĉi tiu juvelo kostas ne pli ol la svedlingva eldono, kiu ampleksas 100 000 ekzemplerojn, tiam oni ne povas ne konkludi ke ĉi tiun libron oni nepre devas posedi. Ne malproksime estas la Tago de la Libro, la festoj de Sankta Nikolao kaj Kristnasko. Pli inda donaco por Esperantisto ol tiu ĉi libro ne estas imagebla .....

Mi notis la jenajn esprimojn kaj vortojn ne troveblajn en Plena Vortaro (1a eldono), sed grandparte troveblajn en aliaj vortaroj, ekzemple en Enciklopedia Vortaro de Wüster (W), vortaro angla-esperanta de Fulcher kaj Long (F-L), kaj en la nederlanda vortaro de van Straaten (S). La nombroj indikas paĝojn sur kiuj la koncernaj esprimoj troviĝas; steleto montras ke tie ankaŭ troviĝas klarigo.

Anaskonkoj (103), ĉu *Lepas anatifera*?; *bangalo* (194; W); *bonito* (82*, W); *foceno* (102; W); *Goljato* (98, 99; W: Goliato); *ĝipo* 5, 17, 46* (angle: *jeep*); *irsulkaĵo* (140; S); *koktel(plet)o* (26, W); *korifeno* (73*, W); *lamo* (speco de ŝafo) (16, 47, S), ĉu identa kun *guanako* (p. 103 de ĉi tiu numero)?; *mangoarboj* (50), ĉu preseraro por *mangloarboj*?; *manglo* (62*); *naŭtika* (mejlo) (8, S); *pelagia* (98*) kaj *pelegia* (101); *procelario* (151); *remora-fiŝoj* (6, 87*); *rinodonto* = *balenŝarko* (88); (*vapora voj*)*rulilo* (79); *skafiŝoj* (6, 87*); *rinodonto* = *balenŝarko* (88); (*vapora voj*)*rulilo* (79); *skafandristo* (6, 113, F-L); *skombro* (6; S, F-L); *serpentskombro* (84); *splinti* (194, S); *sulo(j)* (151); *taroradikoj* (127); *trado* (9, 14, ... F-L); *tunfiŝo* (6, 72) [ĉu identa kun *tino* (F-L; S) kaj *tonfiŝo* (F-L)?]

Preseraroj estas malmultaj, el kiuj mi menciu unu: *Roggeween* sendube devas esti *Roggeveen*. Mi konstatis la regulan uzon de *sen* kun infinitivo, kaj ankaŭ la neuzon de la sufikso *-op(e)*. Mi notis kelkajn kritikindajn esprimojn: *maldungi sin* (32) (por: maldungigi sin, maldungiĝi, eksiĝi el sia ofico); „subite unu *rado* trapikiĝis" (50) (pneŭmatiko); „fari sian *plejeblon*" (50); *centnombre* (103); „Herman restis rigida ..... sed ne pli, ol ke li galopis ....." por: „H. restis rigida ....., kio tamen ne malhelpis lin galopi .....". La bagateleco de ĉi tiuj kritikoj substreku la bonecon de ĉi tiu juvelo de nia literaturo.

W. P. R.